


# Serĉante la kurson

Josep (g3@ellaberinto.net)

## 1. Socia proprieto kontraŭ kapitalisma proprieto



### Enkonduko

Ĉe periodoj el akuta socia krizo kiel la nuna, kiam ŝanceliĝas kaj fendiĝas ĉiuj la ligiloj, kiuj je la pasinto formigis la penson kaj la konduton de la tuta socio, ni mergiĝas en la necertecon kaj la mallumon. Ni troviĝas ĉe labirinto ŝajne senelira. La reserĉistoj de la Scienco (biologoj, kemiistoj, genetikistoj, matematikistoj...), scias multe pli ol la sociologoj kaj la politikistoj, ke por tiuj ĉi situacioj el mallumo kaj necerteco ne utilas la malnovaj receptoj de la pasinto, ke la analizoj fariĝas kontraŭdiraj kaj nesufiĉaj, kaj ke novaj konjektoj bezonas devige malfermi novajn reserĉkampojn, novajn kielojn por kontroli kaj pravigi la rezultojn de la serĉo, kiujn, kvankam ili estas antaŭ la okuloj, oni ne atingas tute klarigi. Forlasi flanken la stablitajn dogmojn kaj krizigi la gravajn atingojn de antaŭaj homoj, sur kies scio ni bazas la grandajn antaŭeniron de nia socio, estas tasko, kiun nur malmultaj kuraĝas entrepreni.

Tiun serĉantan vojon, kiu estas la komuna denominatoro de tio ree nomita de mi *konstruanta socio* (ĉefe nun, kiam la scienca metodo alproprigas ĉiam per plia forto ĉiujn kampojn de la vivo kaj de la agado de la socia homo), oni ne vidas ĉe la kampo de la sociologio, de la politiko, de la filozofio aŭ de la ekonomiko. La serĉanta vojo estas obstrukciĝinta kaj ankiloziĝinta ĉe tiuj sferoj. Adorantoj kaj misfamigantoj de la grandaj pensuloj, filozofoj aŭ ekonomikistoj de la pasinto restas ankriĝintaj en ili, en iliaj teorioj, en iliaj respondoj aŭ en iliaj konjektoj malgraŭ tio, ke tiuj ĉi montriĝas ĉiam pli nesufiĉaj. Oni daŭrigas turniĝi sur la verkoj de Marx, de Keynes, de Malthus, de Kant, de Nietzsche, de Smith, de Ricardo, de Schumpeter... eĉ iuj revenigas nin al la kavernoj de Platon, sen atingi kompreni la radikalan kritikon de iliaj konceptoj kaj sen atingi formigi novajn kontribuojn, kiuj anstataŭigu la malnovajn. La Frankfurta Skolo restis sen daŭrigantoj. Por iuj ĉio tio utilas por reaserti, ke ni alvenis al la fino de la ideologioj, al la fino de la filozofio, al la fino de la ekonomiko aŭ al la fino de la politiko. Tio devige pravas, ili diras, ĉar nenia

antaŭaĵo klarigas la okazintaĵojn kaj la situaciojn, kiujn la Homaro alfrontas ĉe la komenco de la 21a jarcento kaj ĉar neniu el la antaŭaj respondoj ŝajnas utili antaŭ la graveco de la nunaj problemoj. Tamen la plimulto de la pensuloj kaj analizistoj konsentas pri tio, ke ni estas mergitaj en grava civiliza krizo, kiu havas preskaŭ neniun komunaĵon kun la antaŭaj grandaj historiaj ŝanĝoj kaŭze de sia graveco kaj ĉioamplekseco.

Kontraŭe mi pensas, ke ni estas antaŭ la fino de nenio. Ĉu per ia aŭ alia maniero la homa socio respondos ĉe ĉiu kampoj de sia agado tiun periodon de socia krizo. Novaj pensoj ĉu filozofiaj, ekonomikaj aŭ politikaj, novaj konceptoj pri moralo, etiko aŭ homa digneco, novaj sociaj leĝoj... anstataŭigos la nunajn. Neeviteble nova historia periodo por la Homaro estos starigata sur aliaj bazoj. Fruktodona periodo por nia speco –aŭ eble katastrofa. Nenio estas antaŭskribita pri tio.

La Tria Regno kaj ankaŭ la rusa revolucio estis fiaskitaj klopodoj (kun grava kontraŭkapitalisma determino) entrepreni novan historian periodon, kiu estis diktatora kaj faŝista. La imperio de Bush estas nova klopodo por malfermi tiun ĉi vojon.

Nura kaj simpla afero findecidos tiun estonton je unu aŭ alia direkto: **la socia aŭ kapitalisma proprieto sur la rimedoj kaj la produktiloj**. Kaj ĉefe la socia aŭ kapitalisma proprieto sur la SCIO starigita de la senmezure kreanta kapablo de la homa socio, la plej granda produktiva forto el ĉiuj la tempoj, taŭga revolucii senĉese kaj favore la vivon kaj la bonfarcon de ĉiuj la loĝantoj de la Tero.

Sur tiu demando kaj sur neniu alia estos konstruata nova historia periodo por la Homaro. Fermi la okulojn antaŭ tiu ĉi neevitebla kaj malfermita milito inter la konstruanta socio kaj la parazita kaj predanta povo estas eviti la veran kernon de la afero.

## La demando pri la proprieto

Nesurprizinde estas la pensuloj kaj ekonomikistoj pli proksimaj al la povo, kiel la peruano *Hernando de Soto*, kiuj denove starigas sur la tablo la demandon pri la proprieto. Gajninto de la premio "Milton Friedman", kiun koncedas la "ideolaborejo" plej prestiĝa kaj plej proksima al la skipanoj de Bush (la Instituto Cato), li estas ofta vizitanto de la Blanka Domo, de la UNO, de Putin, de la Davosa Forumo aŭ de la Forumo de Porto Alegre. Li estis laŭdata unuvoĉe de Reagan, Margaret Thatcher kaj Francis Fukoyama kaj benata de Clinton mem kiel unu el la plej influhavaj ekonomikistoj pro la reformigado de la kapitalismo. Liaj iradoj konas neniun landlimon: en Peruo kun Alan Garcia, kun Fujimori kaj kun Toledo. En Salvadoro, Egiptio, Filipinoj, Meksikio, Etiopio, Pakistanio, Nigero...



Hernando Soto kuraĝas diri, ke "La kapitalismo estas privata klubo kun enirrajto" kaj nur la atingo de proprieto (la laŭleĝigo de rajto al la proprieto) estas la rimedo je

dispono de la 5.000 milionoj de malriĉuloj por integriĝi en la tutmondiĝa disvolvo. Por tio li proponas atestigi propaĵon pri la tero, pri la domoj, pri la ĥatoj, pri la faveloj... Evidentas, ke Hernando de Soto estas fervora defendanto de la proprieto. De la privata proprieto.

Ĉe la disvolvita kapitalisma mondo multaj civitanoj estas propriuloj. De ilia loĝejo, de ilia veturilo aŭ de iliaj personaj utilaĵoj. La plej favorataj de pluraj loĝejoj, de pluraj veturiloj aŭ de multnombraj personaj utilaĵoj. En la kapitalisma mondo estas malmutenombraj la civitanoj proprietoj de produktimedoj taŭgaj por generi grandajn produktajn varokreantajn procezojn kaj de la rimedoj por ilin distribui. Ankaŭ en la kapitalisma mondo estas ankoraŭ multe malpliaj la propriuloj sur la financa ilo (LA MONO), kiu taŭgas ebligi la daŭrigadon de la kapitalisma produktiro.

Ekde kiam nova proprieto (la financa proprieto) eklipsis kaj subordigis la malnovajn kapitalismajn proprietojn (tiujn de la produktantaj sektoroj), ni rajtas diri, ke nova periodo ĉe la povosfero komencis. Henry Ford vantis pri tio, ke la kapitaligprocezo de lia aŭtomobila imperio ne pasis tra la bankaj entreprenoj. Tia situacio estas nepensebla hodiaŭ.

Nur senlimaj sumoj de mono ebligas generi grandajn sciencajn kaj teknikajn reserĉprojektojn, Multekostajn militistajn kaj kosmajn projektojn, detalemajn kurt-kaj longtempajn strategiojn por la prilaborado de naturaj rimedoj, por konstrui retojn de akvo- kaj gasoduktoj ĝis la manufakturejoj, por entrepreni militajn konkerajn kampanjojn, por reorganizi iujn merkatojn kaj detruigi aliajn. Nur el la financa povo oni povas organizi nuntempe tutmondan povon. Neniu entrepreno, kiom ajn granda ĝi estu, kapablas entrepreni taskon tiom ampleksa.

Tiuj egaj monsumoj ne estas nuraj simbolaj moneroj kreskiĝantaj aŭ malkreskiĝantaj memvole. Ili estas la komuna formo, per kiu ĉiu varo aliformiĝas al ŝanĝvaloro: ili estas la universala varo, kiu ne povas ĉesi la senfinan serĉon pri plia profito. La Kapitalo ĉiam devas produkti profiton.

La investoj je militaj projektoj ekzemple devas redoni profiton al la Kapitalo. Trafaj naturaj mineralaj, petrolaj... rimedoj estos lanĉitaj al la merkato pro daŭre plenumi sian funkcion: mono-varo-varo-mono. Nur kiam tiu rondo ne povas efektiviĝi, ili estas disigitaj de la cirkulado kaj trezorigitaj. La amasigo de TREZOROJ estis ĉiam celo de la povo, kvankam ĝia atingo povintus tute paralizi dum longaj periodoj la disvolvojn de la socioj. La riĉabundo kaj majesteco de kasteloj, fortikaĵoj, preĝejoj aŭ palacoj kontrastas ĉe multaj civilizoj kun la ankilozigo de ties socioj. La financa kapitalo estas la plej perfekta formo de la kapitalista proprieto. Ĝi estas amasego de produktrimedoj (homa kapitalo, konoj kaj resursoj) ĵetitaj je la servo de la povo. Ĝi estas la povo.

Ni rajtas diri do, ke ni parolas pri malsimilaj proprietoj. La proprieto, pri kiu parolas Hernando de Soto, estas partikulara okazo de proprieto neniel tuŝanta la kapitalistan produktkielon kaj neniam tuŝis ion ĉe aliaj antaŭaj produktkieloj, kie la

individua privata proprieto ekzistis je unu aŭ alia maniero. Privata proprieto kaj kapitalista proprieto havas nenion komunan.

Kion forgesas sinjoro Hernando, estas alitipa privata proprieto alieniĝinta ekde la komenco mem de la predantaj socioj: tiu de la laborforto de la homo, tiu de la kreiva kaj aliformiganta homkapablo. Tiu individua proprieto, kiun la socio aliformigis kiel "socian kapablon", estis ĉiam senproprigita al la homo. Li estis devigita vendi ĝin kontraŭ manĝo kaj loĝejo, kontraŭ eta rikoltoparto, kontraŭ vivtenada salajro aŭ kontraŭ paro da dolaroj tage.

Malgraŭ ĉio, la Homaro povas fieri esti vivinta, laborinta kaj disvolviĝinta laŭ granda mezuro flanke de la regantaj predantaj sociaj sistemoj. Vi mem kunsentas pri tio, ke ĉe la komenco de la 21a jarcento, dum plena tutmondiĝanta procezo, la 60% de la rusaj civitanoj ekzemple vivas en la mergita ekonomio kaj ĉe la tria Mondo nur 20% ĝis 30% de la loĝantaro estas sub la leĝimpero. Vi proponas oferi la proprietestilon pri la eta terparcelo, pri la ĥato, pri la favelo, pri la rifuĝintotendo... al la 5.000 milionoj da senhereduloj de la Tero, por ke ili povu integriĝi je la leĝimpero. Vi estas geniulo meritanta ĉiujn premiojn de la Instituto Cato.

Nek la proprieto sur terparceleto, nek la proprieto sur loĝejoj aŭ uzaĵoj, nek la proprieto sur manlaboristaj rimedoj, nek la mikrokreditoj, nek la justa komerco integros la senheredulojn al la kapitalista merkato. Neniu tielproduktita varo trovas lokon en tutmonda merkato, kies teknologia efikeco atingis ekterordinarajn kaj senkonkurencajn limojn. Tiaj privataj propraĵoj, ĉu individuaj aŭ familiaj, tuŝas nenion en la sociaj procezoj. Ili estas preskaŭ ekstremaj kaj senesperaj vivtenad- kaj kulturoregadformoj.

Paradokse dum ni homoj estas tute senproprigataj de nia Komuna Havaĵo (DE TIO, KIO ESTAS NIA SOCIA PROPRIETO), oni volas timigi nin per la "perdo" de nia eta individua privata propraĵo, kiu plej ofte estas kidnapita de iu banka kompanio aŭ sub la senprotektado de mona sistemo funkcianta flanke de kiu ajn scienca leĝo. Estas ridindaĵo, ke la famaj intelektuloj de la povo taksis la "gajnon" aŭ la "malperdon" de nia individua propraĵo kiel la ĉefa demando por la vivtenado aŭ la reformigo de la kapitalista sistemo.

La demando, kiun Hernando de Soto, ne taŭgas alfronti nek klarigi estas tio, kial milionoj da senhereduloj ne havas nek povas havi lokon kiel "salajruloj de la Kapitalo", kio finfine estis la natura integriĝformo de la disvolviĝintaj kapitalistaj socioj ĝis nun. La saman demandon mi starigis antaŭ Jeremy Rifkin kaŭze de lia propono pri kreado de kvara sektoro, kiu devus sin nutri de la neeviteblaj delokituloj (repuŝituloj) de la kamparana, manlaborista aŭ priserva sektoroj.

Neniu el ili du kapablas respondi la demandon. Rimarkinde neniu el ili proponas solvojn historie novemajn. Dum la Romia Imperio la uzurpinta aristokrataro aliformigis la kamparanojn al romiaj civitanoj, kiujn ĝi subtenis per almozoj kaj subvencioj (ankaŭ per pano kaj cirko), dum amasoj de sklavo realigis la kamparanan produktadon. Ĉe la Kolonia Imperio oni forrabis ĉiujn la rimedojn kaj riĉaĵojn

bezonatajn de la romiaj magazenoj kaj lasis la loĝantaron je la vivtenadlimoj por eviti ribelojn kaj tumultojn. Tiu ĉi situacio ne eltenis la puŝon de la Historio kaj la Romia Imperio disfalis.

Verŝajne K. Marx pritemigus kaj disvolvus pli ekstense siajn valoroplenajn reserĉverkojn pri la sama demando kaj memevidente tio kondukus lin modifi liajn politikajn pensojn. Laŭ li neniel estas komprenebla la amasiga funkcio de la Kapitalo sen la salajrata laboro. Nek la kapitalista disvolvo sen la privata proprieto sur produktrimedoj teknologie multe pli antaŭenirintaj ol tiuj servutaj. Post ventmuelilo, li diris, vi trovos servutajn rilatojn. Post hidroelektra centralo, nur povas disvolviĝi salajritaj rilatoj.

La analizo de la kapitalista procezo el pasintaj jarcentoj ŝajnis konfirmi lian teorion. La naskiĝo de la industria mondo estas nedisigebla de la grandaj kamparanaj transformiĝoj, de la teknologiaj novigadoj, de la manufakturaj mekanizadoj, de la disvastigo de la transportiloj, de la uzado de novaj energiaj fontoj kaj de la grandaj ŝanĝoj en la laborformoj. Ankaŭ de la apero de socia sektoro alpropriganta ĉiujn tiujn novajn produkrimedojn kaj aĉetanta la homan laborforton (unue metiistan kaj poste ĉiam pli specialigitan) kontraŭ salajro. Sed la salajrata naturo je la unuaj etapoj de la disvolvo de la kapitalistaj socioj estis ege mizera. La laboriston oni submetis al la freneza ritmo de la maŝinoj kaj al la hardega labora disciplino kun tre longaj labordeĵoroj ĉe mizeraj cirkonstancoj. Viroj, virinoj kaj infanoj laboris por magra salajro kaj vivis kunamasigintaj en la marĝenoj de la grandaj ĉefurboj. Multenombraj skribitaj dokumentoj montras la terurajn staton de la laborista vivo ĉe la okcidenta mondo. La salajrata laboro estis nenio plu ol punlaboro ŝanĝe de porvivtenada salajro je nenio simila al tio, kio estis poste ĉe la disvolviĝintaj okcidentaj socioj.



Tiu ĉi feroĉa ekspluatado de la homa laboro riĉigis la prirabantajn sektorojn, kiuj amasigis egajn kvantojn da varoj baldaŭ bezonantaj multe pli ampleksajn merkatojn. La porvivtenadaj salajroj ne sufiĉis por malplenigi la varomagazenojn. Marx scias, ke nur la lukto de la kuniĝintaj laboristoj atingos bremsi la neeviteblan subiĝan tendencon de la salajroj, kaj tiel skribas en la Manifesto:

"La interesoj kaj la vivkondiĉoj ene de la proletaro niveliĝas pli kaj pli laŭmezure ke la maŝinaro forviŝas la diferencojn de la laboro kaj malpliigas ĝenerale la salajron al la sama nivelo de neelstareco. La kreskiĝanta konkurenco inter la burĝoj mem kaj la komercaj krizoj resultantaj el ili faras, ke la salajro de la laboristoj estu ĉiam pli malstabla; la senĉesa kaj ĉiam pli rapida perfektigo de la maŝinaro faras, ke la stato de la laboristo estu ĉiam pli mizera..."

Ekde kiam la socio kapablas uzi ilojn pli efikajn por transformi la naturrimedojn (uzi novajn sciencajn konojn), oni ĉiam atingis rezultojn, kiuj estis nepenseblaj antaŭe, kaj malfermiĝis periodoj de socia lukto por la alproprigo de tiuj ĉi rimedoj (kaj por la divido de la profito). La grandaj eltrovoj de la unuaj industriaj revolucioj lasis senparole la civitanojn, kiuj vidis esperigitaj promesoplenan estonton. Baldaŭ

plenpleniĝis la magazenoj samtempe ke la mizero kaj la mankaĵoj disvastiĝis ĉe la laboristaj sektoroj. Superproduktada krizo kaj mizero kuniris.

Nur ĉe la socioj, kie la burĝaro pro la laborista lukto devis cedi pli bonajn salajrajn kaj prilaboran kondiĉojn, plenumiĝis parte la kapitalista logiko: la leĝo pri monovaro-varo-mono. Salajrata laboro kaj kapitalo estis la motoroj de granda disvolvo de la produktfortoj, kie la valorleĝo (ĉio estas aĉetebla, ĉio estas vendebla kaj nenio ekzistas, se ĝi ne estas aĉetebla aŭ vendebla) povis plenumiĝi eĉ sub la ĉiama damokla glavo de la ekspansiaj kaj recesiaj cikloj. Nur dum tiu ĉi periodo plenumiĝis la amasiga funkcio de la Kapitalo surbaze de la laboro je ties salajrata formo. Nur dum tiu ĉi periodo ni povas diri estrikte, ke la kapitalista produktkielo kaj la salajrata laboro estis nedisigeblaj. Egaj laboristlegioj estis pusĵtaj al la ĉenlaboro en uzinegojn...

Sed produktkielo ne estas difinita de la specifa formo pagi la laboron, nek de la malbonstateco de tiu ĉi, nek de la konkretaj aspektoj de la ekspluatado de la homa laborforto. Se la kapitalistoj aĉetis la laborforton kontraŭ salajro (iu ŝanĝomonero) kaj tial la analizistoj kaj la fakuloj definis ĝin kiel "salajratan laboron", tio estis ĉar la mono estis aliiganta al la universa ŝanĝovaro, kiel ĝi neniam estis antaŭe. La monero, la bilo, la ordonkambio ktp estis jam kreitaj de tre malnovaj civilizoj, kiel la persa, kvankam aliaj interŝanĝiloj estis plej kutime uzataj (tritiko, oro, eburo, salo ktp) ĝis la disvolvo de la kapitalismo.

La kapitalista produktkielo estus neniel aliigita, se la pago de la laboro estus okazinta per aliaj interŝanĝiloj (manĝaĵoj, uzaĵoj, produktparto aŭ paro da dolaroj tage). Tio oni faris per mono, ĉar tiu ĉi estis interŝanĝovaro ege pli rapida kaj efika ol la antaŭaj. Baldaŭ la plasto forlanĉos ĝin en la prahistorion.

Kio difinas reale produktkielon estas la kielo produkti. Estas la rimedoj, la iloj, la konoj uzitaj por produkti. Ĝia karaktero estas simple teknika.

Krome kio difinas produktkielon estas la karaktero privata (individua, grupa aŭ grupara) aŭ socia de la produktrimedoj. Tio ĉi estas la sola determinanto pri la celoj kaj la direkto de la produktado. Ties karaktero estas ĉefe politika (de povo).

Ĉe la longa konata periodo de nia historio estis la privata alproprigo de la produktrimedoj kaj ne la konkreta ekspluatad- kaj pagoformo de la laborforto, kio difinis ties forrabantan karakteron. Ĉe ajna teknologia etapo de nia irado, ĉe ajna specifa produktkielo (kiun ni povus limigi laŭ la punktoj, kie la aplikata kono faris kvalitan salton), neniam estis antaŭdecidite, ke la socia proprieto sur la produktrimedoj devige perdus la batalon kontraŭ la privata alproprigo. Oni povas konstati, ke milfoje ribelis la sklavoj, la plebanoj, la kamparanoj, la servutuloj, la metiistoj, la laboristoj... kontraŭ aristokratuloj, cezaroj, reĝoj, feŭdaj sinjoroj, estroj aŭ kapitalistoj. Kaj milfoje plu rebelos ni civitanoj.